

Intensaj pluvoj kaj ŝtormoj provokas damaĝojn en la okcidento de Kubo



Foto: Tribuna de La Habana

Havano, mar 23 (RHK) Dum la posttagmezo de ĉi tiu vendredo, inter la 13:00 kaj la 18:00 la loka tempo, okazis diversaj lokaj ŝtormoj en la okcidento de la lando, kiuj rilatis al la movado de nubaj strioj kun pluvegoj, pluvoj kaj fulmotondroj, asociitaj kun la fronta zono kiu moviĝis super la sudorienta Meksikia golfo kaj la okcidenta regiono de Kubo.

La Prognoza Centro de la Instituto pri Meteologio konfirmis, ke ekde la fruaj horoj de ĉi tiu sabato matene okazas pluvegoj, pluvoj kaj fulmotondroj, kiuj povas fari ĉi fortaj kaj intensaj en kelkaj lokoj en la okcidento.

La averto de la Prognozo-Centro deklaras ke en lokoj kun fulmotondroj, la forto de la ventoj kaj la alteco de la ondoj povas pliiĝi.

Anka? asociitaj kun la pluvoj estis raportitaj kelkaj ventoblovoj, kiuj estis signifaj kaj raportitaj ?e la meteologiaj stacioj de Bahía Honda kun 66 kilometroj hore kaj Bauta kun 75 kilometroj hore, amba? en la provincoj de Artemisa, la fonto emfazis.

Same, en Havano, fortaj ventoj estis perceptitaj en la municipoj de Arroyo Naranjo, Boyeros, San Miguel del Padrón kaj Cotorro.

La registaro de Havano raportis inundojn pro superbordi?o de rivero Luyanó kaj en aliaj municipoj okazis dama?oj en tegmentoj de domoj, lernejo kaj unu hopsitalo.

La sekretario de la komunista partio en Havano Luis Antonio Torres Iribar kajla guberniestro Yanet Hernández, kune kun la ministro de energio kaj minoj Vicente La O kun aliaj a?toritatuloj provincaj kaj lokaj, vizitis la municipojn Boyeros kaj Cotorro por taksu kaj atenti la dama?ojn provokitajn pro la meteologia situacio.

La lo?antaro devas resti atenta al la avertoj de la Prognoza Centro de la Instituto pri Meteologio, kiu subtenas proksiman monitoradon de ?i tiu meteologia situacio.

Fonto: portalo Facebook de Havana Registaro

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/350398-intensaj-pluvoj-kaj-stormoj-provokas-damagojn-en-la-okcidento-de-kubo>



Radio Habana Cuba